


# *Zamenhofa metiejo en la urbo de kakao*

---



Ĉu vi konas la urbon de kakao en Kubo? Ĉu vi scias pri “la plej bela tero iam vidita de homaj okuloj”? Jen unika ĉanco sperti kaj konfirmi tiujn vortojn de Kristoforo Kolumbo kiam alvenis al Barakoa la 27-an de oktobro 1492, en la orienta ekstremo de Kubo, kie hodiaŭ Esperanto havas niĉon tre viglan kaj gastaman!

Barakoa estas urbo de la orienta provinco Guantánamo, kaj ĉia nomo devenas de la aruaka lingvo, kies signifo estas mar-ekzisto. Ĉi estas la plej antikva urbo de Kubo tial ke ĉi estis la unua fondita de la hispanoj, la 15-an de aŭgusto 1511, kiam komenciĝis la insula koloniigo en la 16-a jarcento. Ĉia oficiala nomo tiam fariĝis Vilaĝo de Nia Sinjorino de la Asunción de Baracoa.

Ĉi estas nacia monumento de Kubo, banata de la rivero Mielo kaj inter ties naturaj allogaĵoj estas la riveroj Toa kaj Yumurí, krom La Amboso de Barakoa.

Kaj precize en tiu ĉi urbo, de la 12-a ĝis 16-a de decembro, ĉe la ĉarma bieno Duaba, okazos la 24-a Zamenhofa metiejo, tutlanda jara renkontiĝo, kiun organizas la esperanto-grupo de la provinco Guantánamo.

Ĉi-jare la ĉeftemo de la tutlanda metiejo estos Hobioj, kiu ebligos al interesitoj prezenti siajn hobiajn ligojn al la IL; ankaŭ okazos prilingvaj lecionoj, prezentoj de didaktikaj ludoj, fakaj kunsidoj kaj ankaŭ kultura kaj ekskursiva programo.

La grupo de Esperanto en Guantánamo konsistas el sperta teamo kiu jam de multaj jaroj gvidas la movadon en la plej orienta parto de Kubo, kaj ĉi estas unu el la plej stabilaj teamoj kiuj dum jaroj bonvenigas iniciatojn kaj aktive partoprenas la komunuman vivon.

Kiel filio de Kuba Esperanto-Asocio ĉi prizorgas la movadan vivon en la urbo Guantánamo kaj invitas esperantistojn el la tuta mondo, veni kaj kundividi spertojn en la regiono de kakao kaj belaj pejzaĝoj.

---

<https://www.radiohc.cu/eo/especiales/exclusivas/206058-zamenhofa-metiejo-en-la-urbo-de-kakao>



**Radio Habana Cuba**